



aktuala

36-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957. Eldonisto kaj redaktisto: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; **Novaj redaktistoj ek de Januaro 2012:** **Samy kaj Laŭrenco Loisse, 95 Tir aux Pigeons 1150 Bruselo, laur1150 @ yahoo.fr**; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Abona membriĝo nur por adresoj en Belgujo, 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; El tiro 150 ekzempleroj. In formoj : www.esperantobruselo.org ; aktuala.retejo.net ; br11.leadhoster.com ; ebg.skynetblogs.be ; uea.org ; paulo.retejo.net ; barelo.blogspot.com ; esperanto.net ; esperanto.be ; lernu.net ; liberafolio.org ; eo.eventeo.net Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Kotiztabelo kaj Novaj Redaktistoj de Aktuala ek de Januaro
- Paĝo 3 - Poemaro de Camoens, Garcia Orive, Korpilahti
- Paĝo 5 - Dina en Pirineoj
- Paĝo 6 - Lucien Michaux Tradukis
- Paĝo 7 - Raporto de Francine
- Paĝo 9 - Pri Adventistoj, Remonstrantoj, Mormonoj
- Paĝo 14 - Forpasis la Livona Lingvo;
- Paĝo 15 - Fotoj de Esperantaj Eventoj de EBG
- Paĝo 16 - Esperantaj Vortaraj Paĝoj kun Desegnaĵoj

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Septembro 2011

- 14 Bernard-Regis Larue, nia dumviva membro, prelegis pri insulo Malto
- 21 Rodica Todor, nova prezidanto de IFEF, prelegis pri sia lando Rumanujo
- 28 Piet Glorieux, el Kortrijk, prelegis pri Klimata Varmiĝo de Nia Planedo

Oktobro 2011

- 5 Semajna Kunveno (1-8/10 Internacia Semajno de Kulturo kaj Turismo en Malgrat de Mar apud Barcelono)
- 12 Bernard-Regis Larue daŭrigas prelegon pri nuna Malto, Gozo kaj Comino
- 19 Semajna Kunveno
- 26 Semajna Kunveno

Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

KOTIZ-TABELO 2012

Nro	Kodo	Kategorio kaj Kotizo	€	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO				
11	MEM	Membro de EBG	10	Abono al "Aktuala" (organo de EBG)
12	MEM-R	Membro-junulo (ĝis 26-jara)	5	+
13	MEM-S	Membro-pensiulo, senlaborulo	7	partopreno en la vivo de la Grupo
14	FAK	Familia kunloĝanto	2	Partopreno en la vivo de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo (25 X MEM kotizo)
BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ				
21	APE	"Association pour l'espéranto"	14	Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
22	FEL	Flandra Esperanto-Ligo (FEL)	25	Membro+Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva)
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO				
31	SA	Abonanto de "Esperanto"	38	Abono al "Esperanto", monata organo de UEA
32	Kto	Abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro kun "Jarlibro"	25	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	61	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !
35	MG	Membro kun "Gvidlibro"	10	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)
36	SZ	Membro de Societo Zamenhof	122	Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1525	MA de UEA dum la tuta vivo! (25 X MA kotizo)

Kara membro de EBG, bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2012 al konto 000-0 123 048-52

NOVAJ REDAKTISTOJ DE AKTUALA EK DE JANUARO 2012



Dekstre maldekstren Samy kaj Laŭrenco Loisse, membroj de EBG, novaj redaktistoj de Aktuala ek de Januaro 2012

POEMARO: LA LUZIDOJ DE CAMOENS

49

Daŭrige la horora monstro vortis
pri nia fato, kiam kun defio
mi lin demandis: "Miron al mi portis
ĉi korpo de gigant'!. Vi estas kio?"
La buŝon kaj l' okulojn nigrajn tordis
li kaj post laŭta kaj terura krio
respondis per amara voĉo peza,
ke ŝajnis la demando malkompleza;

50

"Mi estas la kaŝita granda kabo
de vi nomata Kabo de l' Turmento;
al Pomponio, Ptolemeo, Strabo,
Plinio, nekonata, kaj al gento
antikva; kvazaŭ fino per bartrabo
mi estas de l' afrika kontinento
kaj al l' polus' antarkta min etendas,
sed vi per troaŭdaco min ofendas!

51

Adamastor', mi kruda fil' de Tero,
kun Encelad', Egeo, Centimano,
spitantaj estis en militafero
al la vibrant' de fulmoj de Vulkanio;
ne montojn staplis mi, sed per konkero
agis de l' ondoj de la Oceano:
mi estis kapitan' de l' mar' tranĉata
de l' floto de Neptun', de mi serĉata.

52

L' edzinon de Peleo mi troamis;
por am' al ŝi en tiun riskon venis;
por la ĉieldiinoj mi ne flamis,
ĉar nur la marprincino min katenis.
Kun la Nereidinoj ŝi sin banis
surplaĝe nuda; mian koron prenis
ŝi tuj kaj ĝin ankoraŭ tiel regas,
ke mi nenion plian deziregas.

53

Ĉar havi ŝin ne povis mi esperi
pro l' ega malbelec' de mia vido,
intencis mi perforte ŝin konkeri;
Dorisan alparolis pri l' decido.
Pro timo volis la diino peri,

sed ŝi, kun bela kaj honesta rido:
"Ĉu estas nimfa am' en tia kvanto,
por kontentigi tiun de Giganto?"



Luis Vaz de Camoens (1525-1580)

54

Sed trovis mi rimedon, kun evito
mian honoron perdi, por la savo
de Ocean' el tiom da milito."
Jen estis de l' respondo la enhavo.
Ne povis mi ne esti enkaptilo
(ja grandas de l' amantoj blinda ravo);
plenigis mian bruston ĝis la fundo
deziroj kaj espero kun abundo.

55

Mi, stulta, la militon tuj formetis;
en nokto, difinita de Dorisa,
por mi en malproksimo sin portretis
l' unika, nuda blanko de Tetisa.
Freneze, brakaperte mi impetis;
okule, hare, vange mi per kisa
deliro kovris tiun, kiu estis
la vivo, kiu min korpon estris.

3

4

56

L' amaron, ho! ne diras ĉi rakonto:
Mi kredis ĉirkaŭbraki la amatan,
sed densan kovron de durega monto,
arbaron, ĉirkaŭbrakis mi, malglatan.
Rokegon trovis mi ĉe mia fronto
kaj premis, ne vizaĝon delikatan;
ne hom' mi restis, ne, sed muta bloko
senmova, ĉe la rok' alia roko!

57

Ho nimfo, la plej bela de la maro,
se tro malplaĉis mia kompanio,
kial vi min ne lasis en eraro,
ĉu estus monto, nuboj aŭ nenio?
Forkuris mi, freneza pro amaro,
pro malhonoro, plena de rabio,
alian mondon, por neniun vidi
pri mia ploro kaj aflikto ridi.

58

Jam tiam miaj fratoj, mia klano,
venkitaj estis; en mizer' ekstrema
por plia sekurec' de l' dia vano
jam parton kovris montostaplo prema.
Ĉar kontraŭ la ĉiel' ne helpas mano,
mi, ĉagrenite, en plorado ĝema
eksentis malamika jam Fortunon,
kaj de la far' aŭdaca nun la punon.

59

Fariĝis mia karno tera duro,
kaj miaj ostoj ŝtonigitaj estis;
de vi vidataj membroj kaj figuro
sternitaj tra ĉi longaj akvoj restis.
Finfine min, giganton laŭ staturio,
transformis en ĉi kabon kaj arestis
la dioj; la ĉagren' duoble gravas,
ĉar min Tetisaj akvoj ĉirkaŭlavas."

60

Li tion diris kaj post ega ploro
subite jam neniun plu lin vidis.
La nigra nub' solviĝis kaj ĝis foro
surmaren la sonora blek' inciĝis.
La manojn al la sankta anĝelhorio
mi levis, kiu nin ĉi-foren gvidis,
al Dio petis mi formovi durajn
aferojn, laŭ Adamastor' futurajn.

Kanto 5, 49-60, paĝo 205,
Giganto Adamastoro sin prezentas
al la maristoj portugalaj trapasantaj
la Kabo de Bonespero sude de Afriko.
Leopoldo Knoedt, el Brazilo, elportugaligis

FANTAZIA LETERO

En iu tago de iu ajn jaro.
Malvarmiĝas. Glacia-blankaj vestoj
kovras la stratojn. El la kalendaro

jam falis februaro. Birdaj nestoj
atendas pacience la alvenon
de la flugantaj multkoloraj bestoj,

kiel mi atendas, mian revenon
al vi, kiam la printempa vetero
naskigos flora-butonojn kaj grenon;

kaj ruĝiĝas, per la fragoj la tero
de la malseka sezono, tirano
de la tempo, harmonio de l' sfero

kie la universa uragano
trenas l' horojn al la mistera Krono,
ĵetante ilin al abismo-vano;

profundega nigra puto sen fono,
plenumita de ombroj en silento
sen muziko aŭ alia ajn sono.

Estas belega mia reva sento
malkovrante per la plumo l' sekreton
kiu, kiel freŝa blovo el vento,

alvenas en mian sonĝan kvieton
per voluptaj bildoj el fantazio,
kun kiuj mi faras ĉi poemeton.

Estas por mi grandega sensacio
antaŭvidi baldaŭnan renkontiĝon,
kaj gaja erotika iluzio

sentigas al mi, ama-amuziĝon;
kaj mi, nun atendas tre maltrankvile
nian polan varsovia-kuniĝon

por vivi l' realecon tutsimile
al miaj amsonĝantaj poezioj
en baldaŭna kunestado utile.

Mi revas pri vilaĝaj idilioj;
sopiras, pri paco sub sunaj briloj;
sonĝas, pri salikoj kaj akacioj.

Elvokas odoron de verdaj tilioj,
dezirante, sur la arbara monto
plenumita de muzikbirdaj triloj,

kuŝiĝi apude vi, kaj sen honto,
sur la freŝa herbo kaj bunta flora
tapiŝo, sub ĉielarko-ponto,

per senfina sekskareso amora,
alveni al la edena magio
kie loĝadas la plej amo glora.

Poste, en mia imaga pasio,
mia koro-bato al via sentas
kiel amrecitado-liturgio;

kaj denove, Amoro, al mi tentas
volupte, mian instinkton, Regina;
mia animstato tian konsentas:

ke, la amkaresoj estu senfina
per sorĉa ampetolo diligenta,
ĝis tie la amorado kulmina.

Do, nur sonĝo estas mia letero;
sonĝo, de erotika fantazio
kiu transformiĝis en poezio
interne de mia reva espero;
ĉi tiel estas la seksa mistero.

Alberto Garcia Orive, Bilbao, septembro 2011

DUMVIVAJ MEMBROJ

DE NIA

ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO

BRACKE	Clara
POTERUCHA	Barbara
SPERBER	Francine
DELLILE-MAES	Nicole
VAN DAMME	Emile
KOVACIC	Neven
LARUE	Bernard-Regis
RICCI - MORELLI	Guido
DECEUNINK	Herman
AMADORI	Jan

5

DINA EN PIRENEOJ



Pri mirinda renkontiĝo en Pireneoj.
Esperanta staĝo organizita de la
fervojistaj kluboj de Tuluzo en "Boo
Silhen" de la 5an ĝis 11an de
septembro. La tago de nia alveno la
vetero estis aĉa. Bonŝance, ekde la
sekvanta tago la suno brilis dum la
tuta semajno. La mateno ni laboris
serioze sub la gvidado de niaj spertaj
instruistoj "Christophe", "Jeanine" kaj
"Josée" laŭ la grado. Dum tiu tempo
niaj du kuraĝaj kuiristoj "Andre" kaj
"Michel" preparis por ni, diversajn kaj
abundajn manĝaĵojn. Postagmeze,
post la ordigo de la salono pere de
bonvolontuloj, ni ekskursis tra la
mirinda montaro. Pere de belaj vojetoj
kelkfoje krudaj ni marŝis meze de
belaj pejzaĝoj. Ni revenis lacaj sed
kontentaj al nia centro kie atendis nin
kuraĝiga kaj gaja manĝo. La vespero
daŭrigis nian amuzon pere de ludo-
kanto-teatro kaj babilado. Eble

6

aperitivo, bona vina eĉ ĉampano,
alportitaj de diversaj regionoj,
kontribuis al la bona etoso sed la
amikeco kun novaj kaj malnovaj
konatuloj plifortigis tiun varman
etoson. Por mi tiu renkontiĝo restos
unu inter la plej belaj esperantaj
memoraĵoj de mia vivo. Dankon al
ĉiuj kiuj organizis tiun renkonton en
la Pireneoj.

La nura partoprenanta

Belgino,

Dina Deloyer (dinadel@skynet.be)

LUCIEN MICHAUX TRADUKIS Nuno estas donaco

Du homoj, ambaŭ serioze malsanaj,
priloĝis la saman malsanulejan
ĉambron. Unu el ili devis sidigi sin
ĉiupostagmeze en sia lito dum unu
horo por elĵeti sekreciojn el siaj
pulmoj. Lia lito estis apud la sola
fenestro de la ĉambro. La alia devis
travivi siajn tagojn dorse kuŝanta.

La du samsortuloj parolis unu kun la
alia dum horoj. Ili parolis pri siaj
edzinoj kaj pri siaj familioj, priskribis
sian domon, sian laboron, sian
partoprenon ĉe la militservo kaj la
lokojn kien ili estis feriintaj.

Kaj ĉiupostagmeze, kiam la viro en la
lito apud la fenestro povis sidiĝi, li
pasigis la tempon vortpentante al sia
samĉambrano ĉion kion li ekstere
vidis. La viro, en la alia lito,
komencis vivi dum tiuj unuhoraj
periodoj kie sia mondo estis vastigata
kaj gajigata de ĉiuj agadoj kaj koloroj
de la ekstera mondo.

De la ĉambro, la vido rigardis al
parko kun bela lago; anasoj kaj cigno
ludis sur la akvo dum infanoj
velveturigis siajn miniaturnajn boatojn.
La geamantoj brak'en brake paŝis
inter la floroj kun ĉielarkaj koloroj,
altaj arboj ornamis la pejzaĝon kaj oni
povis fore rimarki la urbon konturiĝi.

Dum la viro apud la fenestro
priskribis ĉiujn tiujn detalaĵojn, la viro
ĉe la kontraŭa flanko de la ĉambro
fermis la okulojn kaj imagis la
pentrandan spektaklon. Dum bela
postagmezo, la viro apud la fenestro
detalis defiladon kiu tie pasis.
Kvankam la alia viro ne povis aŭdi la
muzikistaron, li povis vidi ĝin per la
okuloj de sia imago, tiom vivamaniere
pridiris ĝin lia samsortulo.

Tagoj kaj semajnoj forpasis. Iu
mateno, je la banhoro, la flegistino
trovis la senvivan korpon de la
apudfenestra viro, kviete mortinta
dum dormado. Ĉagrenita, ŝi alvokis
la respondeculojn por ke ili forprenu
la korpon.

Tuj kiam li sentis ke la momento estis
taŭga, la alia viro petis ĉu li povus esti
delokita apud la fenestron. La
flegistino, feliĉa konsenti al li tiun
malgravan favoron, certiĝis pri lia
komforto, poste ŝi lasis lin solan.
Malrapide, penige, la malsanulo iom
leviĝis, apogante sin sur kubuto por
glitigi eksteren sian unuan ekrigardon.
Finfine, li ĝuus mem vidi tion kion sia
amiko priskribadis al li. Li streĉiĝis
por malrapide turni sin al fenestro
apud la lito. Nu tamen, ĉio kion li
vidis estis muro !

La viro demandis al flegistino kial sia
forpasinta samĉambrano vortpentris al
li iun tute alian realecon. La
flegistino respondis ke la viro estis
blinda kaj eĉ ne povis vidi la muron.
Ĉu eble li volis nur kuraĝigi vin, ŝi
komentis.

Postparolo : Estas eksterkutima ĝojo
feliĉigi alian spite de niaj propraj
travivaĵoj. Kundividata peno duone
malpliigas la doloron, sed feliĉeco, tuj
post kundivido, troviĝas duobliĝinta.

Se vi volas senti vin riĉa, vi bezonas nur nombri inter ĉiuj aferoj, kiujn vi posedas, tiujn, kiujn mono ne povas aĉeti.

La nuno estas donaco, tial oni nomas ĝin france per la sama vorto (*présent*).

Kial?

Kial ekzistas viroj kiuj havas hundojn kaj ne edzinon ?

1. Ju pli vi malfruas, des pli via hundo estas kontenta vidi vin.
2. Hundoj ne atentigas kiam oni alvokas ilin per la nomo de alia hundo.
3. Hundoj tre ŝatas kiam oni senorde lasas ĉion dise sur la grundo.
4. La gepatroj de la hundo neniam venas viziti vin.
5. Hundoj bone konsentas pri tio, ke ofte necesas laŭtigi la voĉon por komprenigi sin.
6. Hundoj ĉiam estas pretaj foriri ien, ili neniam atendigas vin.
7. Hundoj opinias ke estas komike kiam oni tro drinkis.
8. Hundoj ŝatas iri al ĉasado kaj fiŝkaptado.
9. Hundo ne vekos vin por demandi : "Se mi mortus, ĉu vi prenos alian hundon ?"
10. Se hundo havas bebojn, vi povas anonci tion per reklamo por malembarasi vin pri ili.
11. Hundo lasos vin surmeti al li ĉirkaŭkoloron kun pintoj sen insulte nomi vin frenezulo !
12. Se hundo flaras la odoron de alia hundo sur vi, ĝi ne koleriĝas. Ĝi trovas tion interesa.
13. Hundoj ŝatas vojaĝi en la ŝarĝujo de la kamioneto.
14. Kiam hundo forlasas vin, li ne forprenas la duonon de viaj aferoj. Por provi la teorion, enŝlosu vian edzinon kaj vian hundon en la aŭtejon dum unu horego. Poste, iru malfermi pordon kaj konstati kiu estos kontenta revidi vin !

Lucien Michaux, membro de EBG, Charleroi

RAPORTO DE FRANCINE

Jen kelkaj miaj memoroj pri UK en Kopenhago sub fotoformato.



1. La unuan vesperon sin prezentis diversaj esperantaj asocioj. Inter ili la **fervojistoj**. Mi salutis la reprezentantojn nome de la fervojistoj (Belga Esperantisto Fervojista Asocio) kiuj kunvenas je la merkreda posttagmezo en la brusela stacidomo kun Lucien de Sutter.

Je la fino de la UK, kun du aliaj kongresaninoj mi iris trajne al fama muzeo. Kiam la oni kontrolis niajn trajnkartojn, unu el la du deziris konfirmon ke ni vojaĝas en la bona trajno. La kontrolisto ekrespondis en la angla sed kiam li rimarkis la kongresan sakon li pluparolis en Esperanto. Post momento mi rememoris la fervojiston kiun mi renkontis kelkajn tagojn antaŭe. Ĉu estis li ? Mi rapide fotis lin antaŭ lia foriro el la vagono (Pro tio la foto estas malneta). Kiam ni alproksimiĝis la muzean haltejon, li anoncis tion en la angla, verŝajne kiel kutime por la turistoj, sed ĉifoje ĉiuj vojaĝantoj ankaŭ aŭdis la anoncon en Esperanto. Mi sendis al **Jan Niemann** retmesaĝon kaj li konfirmis ke ja estis li la afabla kontrolisto. Memorinda surprizo kaj travivaĵo.



2. Je la fino de la UK malfermo, iu anoncis ke la belga ambasadoro kaj lia edzino deziris renkonti la esperantistojn kiuj alvenis el Belgio. Poste **Flory** el Ostendo klarigis al mi ke estis ŝi kiu sukcesis alvenigi ilin dank'al la fakto ke ŝi konas la fraton de la ambasadoro.

Flory ĉiam surprizas min. Senĉese senlace entuziasme ŝi propagandas Esperanton.



3. Mi decidis lastmomente vojaĝi al Kopenhago do rezervis nenion. Mia finnlanda amikino **Synnöve** donacis al mi la lastan bileton por la bankedo. Ni sidis kun gejojanoj.

Antaŭ la fama evento Europalia 1989 pri Japanio en Bruselo mi kontaktis kelkajn japanajn esperantistojn. Tiel mi konatiĝis kun **Naĉiko** en Brajtono ĉar ŝi alportis al mi fotokopiojn de fotoj pri sia infaneco. Naĉiko, akompanata de **Yumiko**, alvenis en Bruselo post la UK 2003

en Svedio. La du loĝis ĉe mi. Antaŭ la UK en Jokohamo mi loĝis en Kioto ĉe Naĉiko kiu, malgraŭ maljuneco kaj varmeĉo, montris al mi sian urbon. Memorindaj tagoj por mi. Antaŭ kelkaj monatoj konatulinio Yumiko anoncis al mi la forpason de nia komuna amikino Naĉiko. Kiam komencis la kopenhaga UK mi sentis grandan ĝojon kiam mi renkontis Yumiko-n.

Do ĉe la bankeda tablo mi sidis kun du amikinoj, unu el Finnlando (dekstre sur la foto) kaj alia el Japanio (la dua maldekstre).

La staranta virino donacis al Synnöve kaj mi belan floron mane faritan por meti sur vesto. Bela memoraĵo.

Je la fermo de la UK, Yumiko donacis al mi memoraĵon el Hiroŝimo kie ŝi naskiĝis. Kortuŝa memoraĵo.



4, 5. Mi ĉeestis prelegon de sinjoro **HORI Jasuo**.



Li entuziasme klarigis kiel li propagandas Esperanton per muzikiloj el diversaj lokoj de la mondo.



6. Dum iu vespero mi promenadis ĉe la haveno kaj renkontis nian bruselan membron **Mikaelo** kun Sunfloro, amikino el Norvegio (ambaŭ estis ĝojaj sed bedaŭrinde tio ne aperas sur la foto, mi pardonpetas). Mi ne havis la eblecon manĝi kun ili ĉar post ĉirkaŭ la naŭa vespere maleblas mendi en multaj Kopenhagaj restoracioj. Tio estis ankaŭ malagrabra surprizo en la kongresa hotelo. Sed Mikaelo trovis respondon por la deserto, grandan glaciaĵon. Bela rideto, ĉu ne ?



7. Mi alvenis en Kopenhago kelkajn tagojn antaŭ la malfermo de la UK. Mi multe marŝis malgraŭ la pluvego. Nur marŝado tra urbo permesas ekkoni ĝin. En la centro mi ofte vidis banderolojn anoncantajn la Universalan Kongreson de Esperanto. Mi fotis ĉiujn banderolojn. Dum la aŭkcio, estis surprizo kiam oni prezentis unu banderolon. La dua surprizo estis kiam mi malkovris ke estis mia najbarino **Katia** el Gento kiu

9

sukcesis havi ĝin. Kie ŝi valorigos ĝin? Tro granda por tablo aŭ muro. Gratulon al ŝi. Fakte la gajno de la aŭkcio permesas al la Centra Oficejo havi volontulojn.



8, 9. Ne estas fotoj de la UK. Mi fotis la ĉeestintojn de la **Belga Esperantista Fervoĵista Asocio** dum kunveno en julio.



Francine S., membro de EBG kaj BEFA

PRI PROTESTANTISMO (daŭrigo) ADVENTISMO

Adventismo de la Sepa Tago (1863-) estas fundamentista eklezio de protestantismo, kiu sekvas la usonan profetion, Ellen G. White. Sekvante severan interpreton de la Biblio, adventistoj iras al preĝejo sabate kaj manĝas koŝere, kiel judoj. Ili ne trinkas kafeinon, alkoholon aŭ fumas tabakon. Multaj estas vegetaranoj. Kvankam plejparte protestanta en doktrino (*sola scriptura*, bapto, la Sankta Triunuo, ktp), laŭ adventismo la animo ne estas nature senmorta aŭ

10

povas ekzisti aparte de la korpo. Tial la mortintoj ne nun ekzistas nek en infero nek en la ĉielo, sed estos relevigitaj korpe kaj juĝitaj post la reveno aŭ Advento de Jesuo Kristo. La malbonaguloj ne iros al infero sed estos detruitaj kun Satano. Tial adventismo ne kredas en infero. Post la detruo, la savitoj loĝos por ĉiam kun Kristo sur nova, paradiza tero. Laŭ adventismo, la Advento okazos baldaŭ, kiam Kristo revenos por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn. Pro tio, en 1844 Dio sendis profetion White, por helpi kaj instrui la kristanan eklezion, kiu restos ĝis la Advento. La vizioj kaj skriboj de White, deveninte de Dio, estas aŭtoritata, nur la Biblio estante pli aŭtoritata. Adventistoj uzas ŝiajn skribojn por interpreti la Biblion. Pro ŝia instruo, adventistoj iras al preĝejo sabate kaj manĝas koŝere, inter aliaj. La eklezio, el kiu adventismo venis, antaŭdiris la precizan tagon de la Advento, sed kiam Kristo fiaskis reveni je mardo la 22-a de oktobro 1844, la eklezio disrompis: unu parto, sub la influo de White, fariĝis la nuna adventismo, la alia parto fariĝis jehovismo. Jehovismo korektis la daton, sed White, pro siaj vizioj, diris, ke Jesuo je tiu dato iris al alia parto de la ĉielo por pretigi sin por la baldaŭa Advento. La eklezio praktike toleras eksedziĝon kaj reedziĝon. Pastro devas esti viro, sed li povas edziĝi. La eklezio ne baptas infanetojn. Komunio estas po kvarfoje jare: ĝi estas kun pano, vinbersuko (ne vino pro ĝia alkoholo) kaj piedlavado. La efiko de komunio, kiel bapto, estas simbola. En 2000 estis ĉirkaŭ 11 milionoj da adventistoj tra la mondo (sed ankaŭ milionoj da eks-adventistoj), kreskante tre rapide tra la mondo, precipe en la Tria Mondo, *kvarobliginte* tutmonde dum la pasintaj 25 jaroj. La eklezio estante

tre misiema: nun nur 9% el kredantoj loĝas en Usono, la naskolando de la eklezio. La eklezio havas universitatojn, la ĉefa estante Andrews en Usono. Ĝi ankaŭ havas hospitalojn, eldonejojn kaj misiojn. 100% de la loĝantoj de Pitkarna Insulo estas Adventistoj de la Sepa Tago. Pri idoj de adventismo: La ideoj de White pri sana manĝado instigis la inventon de maizflokaj. Kellogg's estis fondita de adventistoj. Kaj de adventismo ankaŭ venis (per la skisma sekto de Victor Houteff) la sekto de David Koresh, kiu mortis kun siaj sekvantoj ĉe Waco, Teksaso en Usono en 1993, kiam ili estis atakitaj de la registaro. Houteff (floris 1929-55) kaj Koresh (floris 1984-93) vidis sin kiel la profetoj, kiuj sekvis post White. La eklezio ne agnoskas ilin kaj, siaflanke, Houteff kaj Koresh vidas la eklezion kiel sen profeto kaj perdita. Houteff kaj Koresh vidis sin kaj siajn sekvintojn kiel la veraj adventistoj.

REMONSTRANTISMO

La Remonstrantoj aŭ Remonstranta Frataro, estas protestanta liberala sendogma kristana eklezio, sufiĉe malgranda, tipe nederlanda, kiu originis el la Nederlanda Reformacia Eklezio. En 1619, okaze de la Sinodo de Dordrecht, grupo da predikantoj estis eksigita. En Antverpeno ili fondis la Remonstrantan Frataron. Origine ĉi vorto frataro nur indikis la aron da (tiutempe nur viraj) pastoroj; poste ĝi fariĝis la oficiala nomo de l' eklezio mem. Nuntempe oni preskaŭ ĉiam uzas nur la indikon Remonstrantoj. Nuntempe ĉi eklezio havas 46 lokajn komunumojn en Nederlando, kaj unu en Germanio, en Friedrichstadt. Entute estas pli malpli 6500 membroj. Pri historio, la Remonstranta eklezio havas siajn radikojn en la diskutoj en la 17-a jarcento interne de la kalvina

eklezio de Nederlando. La diskutoj grandparte estiĝis ĉirkaŭ la teologia fakultato de la nova universitato de Leiden, kie Arminio kaj Gomaro akre interdiskutadis. Arminio estas konsiderata la unua Remonstranto. En januaro 1610 grupo da predikantoj en la urbo Gouda (prononcu Gaŭda) formulis siajn hezitojn kaj protestojn kontraŭ la oficiala doktrino de la Nederlanda Reformita Eklezio, la eklezio kiun protektis la Respubliko de la Sep Unuiĝintaj Nederlandoj. Tiuj ĉi pastoroj protestis kontraŭ kelkaj instruoj (i.a. koncerne al la libera volo de la homo kaj la antaŭdestino de Dio). Inter ili estis la kortega predikisto de la princoj de Oranĝoj, Johannes Wtenbogaert. En 1610 ili skribe fiksas siajn tezojn en la Kvin artikoloj de la Remonstrantoj. La Sinodo de Dordrecht (1618-1619) kondamnis tiujn tezojn kaj adoptis Kvin artikolojn kontraŭ la Remonstrantoj kiel novan eron de l' Nederlanda Kredkonfeso. Per tio la Remonstrantoj estis elpelitaj el la eklezio, kio devigis ilin fondi propran frataron. La Remonstrantoj precipe akre kontraŭis la devigan Kredkonfeson, en kiu oni plej precize provis fiksi, kion kredo kaj ne kredo la fiduloj. La doktrino pri l' antaŭdestino, kiun ili atakis, deiras de tio, ke Dio jam antaŭ la kreo de la mondo decidis, kiu homo atingos la eternan feliĉon de la ĉielo kaj kiu ne. La Kontraŭ-remonstrantoj opiniis, ke la homo neniel povas influi sian sorton (ĉio estas nura graco de Dio); la Remonstrantoj, male, kredis, ke la homo mem grave influas sian destinion: la homo ja havas certan liberan volon. Tiu ĉi temo ankaŭ jam estis estinta subjekto de diskutado inter Lutero kaj Erasmo, kiu pensis multe pli samvoje kiel la Remonstrantoj. La iniciatinta teologo

de la movado, Jakobo Arminio, jam mortis en 1609.



Kirko de Remonstrantoj en Groningen

Inter ambaŭ partioj estiĝis akraj diskutoj, ne nur en universitata medio, sed eĉ pere de stratbataloj. Ĉar ĉi kvereloj minacis disŝiri la novan Respublikon, en 1618 estis kunvokita sinodo por decidi la aferon. Post la morto de princo Maurits de Oranĝo, kiu forte kontraŭis la Remonstrantojn, iom post iom la forpelitaj pastoroj revenis en la Respublikon. Oficiale la Remonstranta Eklezio tie estis malpermesita, sed fakte ĝi estis tolerata. Multaj lokaj magistratanoj apartenis al ĝi. Nur dum la Franca okupado (1795) la eklezio estis oficiale rekonita. En la tempo de Napoleono ĝi estis je sia minimumo: laŭdire apenaŭ plu 2000 membroj. Pli poste en la 19a jarcento estiĝis florada

12

periodo: multaj liberale pensantaj kalvinanoj foriris el la "granda" eklezio kaj aliĝis al la Remonstrantoj. En la lasta kvarono de la 20a jarcento okazis longtempa diskutado inter la Nederlanda Reformita Eklezio, la Nederlanda Reformacia Eklezio kaj poste ankaŭ la Nederlanda Luterana Eklezio, kio finfine kondukis al kunfandiĝo en novan Protestanta Eklezio de Nederlando. Dum pluraj jaroj ankaŭ la Remonstrantoj partoprenis en la procedo, sed fine ili ne povis aliĝi, ĉar por tio ili unue devis subskribi kiel kredkonfeson la Artikolojn kontraŭ la Remonstrantoj el Dordrecht!

Pri Teologia kontribuo, tra la tempo, multaj Remonstrantoj kontribuis teologie.

-Inter alie, fruaj Remonstrantoj, kiel Hugo Grotius, jam ekstudis la historiecon de la Biblio. Ekde la komenco, la Remonstrantoj kunstudis pri la historia-kritika studado de la Biblio.

-Jam en la 17a jarcento - en rekta kontrasto kun la ĉie en Eŭropo kutima antisemitismo, la Remonstranto Barlaeus montris klaran respekton por Juda rabeno Menasseh ben Israel en Amsterdamo.

-Kaj pli poste, ĉirkaŭ 1735, kiam fama teologo J.J. Wettstein ne plu povis labori en Svislando en sia tekstkritika pristudado de la Nova Testamento (oni akuzis lin pri Socinianismo), la Remonstranta seminario invitis lin fariĝi ilia nova profesoro.

-La Remonstrantoj daŭre defendis liberecon en la religio: ofte citata devizo estas jam delonge: "Unueco en la necesa, libereco en la necerta, en ĉio la paco". Multaj Remonstrantaj magistratanoj en la pli grandaj urboj ankaŭ helpis efektiviĝi sufiĉe tolereman etoson en la lando.

-Jam dum jarcentoj estas kutime en la diservoj, kie oni celebras la Manĝon de la Sinjoro, ke oni invitas ĉiujn ĉeestantojn "sendepende ĉu membro vi estas de tiu ĉi aŭ ajna eklezio, ĉar nin ĉiujn invitas la Sinjoro" (praktiko, kiu nuntempe fariĝas iom pli ĝenerala).

-En la dua duono de l' 20a jarcento okazis tutlanda diskuto, kiu rezultis en tio, ke kiel supozeble unua eklezio en la mondo, la 29an de novembro 1986 la Remonstrantoj forigis ĉian diskriminacion inter geaj kaj geaj rilatoj: kiuj deziras nupti, tiuj tion povos fari antaŭ Dio. Ankaŭ el pluraj eksterlandoj multege da geaj paroj vojaĝis al Nederlando por eklezie festi sian nupton. Intertempe pluraj aliaj eklezioj kaj la Nederlanda politiko transprenis ĉi tiun starpunkton: geja nupto nun eblas ankaŭ leĝe.

Nuntempe la Remonstrantoj internacie estas membroj en:

-Internacia Asocio de Religia Libereco (liberalaj religiuloj, kristanaj kaj ne-kristanaj (budhismaj, islamaj k.a.); en tiu ĉi organizo la Remonstrantoj aktivas ekde kiam ĝi estiĝis en 1907 en Boston, Usono);

-Monda Konsilantaro de Eklezioj (fondita en 1948 en Amsterdam - la Remonstrantoj kunfondis ĝin);

-Internacia Kongregacia Konsilio (por eklezioj de kongregacia formo; membro de post 1949); en 1970 ĝi unuiĝis kun Monda Alianco de Reformitaj Eklezioj, kies membro la eklezio ankaŭ estis.

-Depost 1959 membro de Konferenco de Eŭropaj Eklezioj.

-Depost 1973 membro de Leuenberger Konkordie (konkordo inter reformaciaj eklezioj je Eŭropa nivelo, kiu substrekas, ke siatempaj kvereloj ne plu estu eklezi-disigaj).

La Remonstranta Eklezio distingiĝas de preskaŭ ĉiu alia eklezio per tio, ke ĝi ne havas iun ajn fiksitajn

kredkonfeson, nek la Nicean Kredkonfeson el frua kristanismo, nek Kredkonfesojn el la periodo de l' Reformacio. Ĝi ankaŭ ne havas membrecon ligitan al bapto: ĉu bebo estas bapata, ĉu adulto sin mem igas bapti - ambaŭ ne per tio fariĝas membroj de la Remonstrantoj. Oni nur membriĝas, se oni mem verkas sian personan kredkonfeson kaj prezentas tiun al la loka komunumo, kie oni volas membriĝi. Aŭ oni subskribas iun principodeklaron samcele.

Bibliografio: La Remonstranta Frataro : informilo pri liberala eklezio nederlanda - el la nederlanda tradukis Gerrit Berveling - Breda: VoKo, 1990. - 20 p. Voĉoj kristanaj nr 19.



Gerrit Berveling, Remonstranta pastoro

Gerrit Berveling estas elstara nederlanda esperantisto, naskiĝinta en 1954, membro de Akademio de Esperanto, Remonstranta pastoro, teologo, klasiklingva filologo, mezlerneja profesoro dum 15 jaroj, verkisto, poeto, kaj tradukisto al esperanto nome el la latina kaj el la antikva greka. Ĉefaj titoloj en Esperanto: Laŭdo de l'Stulteco de Erasmo de Roterdamo, La evangolio kopta laŭ Tomaso, Apologio de Tertuliano, Dio Kristanismo Aliaj Religioj, Kie Oni Trovis Tion en la Korano, Tri'astas tro, Nombroj, Stono de Helpe, ktp.

MORMONISMO

Mormonismo estas aro de religiaj konfesioj kaj anoj kiuj sekvas

13
almenaŭ iom de la instruoj de Joseph Smith, Jr., kiu eldonis la Libron de Mormon en 1830. La Movado de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj estas unu el multaj movadoj kiuj estiĝis dum la Dua Granda Vekiĝo en la 19-a jarcento en Usono. Multaj el ĉi tiuj movadoj, inter kiuj troviĝis la Movado de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj, estis forte restaŭrisma en perspektivo kaj ĝi klopodis atingi pli ol la protestantoj kaj restarigi formon de Kristanismo kiun ili kredas esti pli kongrua kun la Nova Testamento. Laŭ sia doktrino, Mormonismo estas la restarigo de la frua Kristianismo en lastaj tagoj. Estas grave kompreni, ke "Mormonismo" ne signifas nur la religion de la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj (la "LDS eklezia" aŭ "Sallagurba eklezio"), sed estas interne kompleksa religitradicio, enhavanta branĉojn kaj subbranĉojn, kiuj diferencas iomete en teologio. Pri disigo de la mormonoj, aparte la Sallagurba eklezio, ankaŭ ekzistas du subtradicioj tre diferencaj. Unue, estas la "Reorganizita Eklezia de Sanktuloj Lasttagaj" (ekde 2001 simple nomita "Krista Komunumo"), kiu elbranĉis je 1844 pro kverelo pri pluraledziniĝo. Tiu subtradicio petas restarigi la fruan mormonan teologion de antaŭ la enkonduko de poligamio kaj templo-ritojn de la 1840-aj jaroj. Due, estas mormona fundamentismo, kiu ne estas organizata eklezio, sed anstataŭ movado aŭ tendenco tre interne skismiĝema. Ties ĉefaj karakterizaĵoj teologiaj estas (1) aserto de doktrino de pluraledziniĝo, kaj (2) tre radikala doktrino pri profetaĵo. Estas la disputoj pri pluraledziĝo, kio kreis tiujn skismojn aŭ branĉojn en la granda tradicio mormona. Laŭ plimultaj historiistoj, Joseph Smith asertis ke, en 1831 il unufoje ricevis dian rivalon komandantan al

14
ekleziulaj viroj edzigi kelkajn virinojn. Komence la estraro praktikis poligamion sekrete, kaj fakte Smith malkonfesis pri tiu doktrino tra la tuta vivo. Tamen, je 1843 li formale registris unu rivalon, asertante pluraledziniĝo, kaj leĝigis sian unuan edzinon, Emma, kiu pasie kontraŭis tiun doktrinon de sia edzo. Eĉ antaŭ Joseph Smith estis mortigita, en 1844, disvastiĝis onidiroj pri la poligamio de la mormona estraro, kaj la doktrino pluraledziniĝa iĝis "malfermita sekreto": komuna kono kion tamen oni povis nei, kiam estas oportune. Fine, la eklezio publikigis la doktrinon je 1852. Pri mormona teologio, tra la tuta movado, estas kelkaj komunaj kredaroj, kiuj apartigas Mormonoj de aliaj Kristanoj: Antaŭekzisto kaj sanktaj skriboj. Antaŭekzisto, aŭ antaŭmorta ekzisto estas la kredaro, ke ĉiu humananimo ekzistis kun Dio eĉ antaŭ la nasko. Tiu doktrino datiĝas de teksto de Joseph Smith je 1833, dirante ke, "Eĉ homo estis en komenco kun Dio. Inteligenteco, aŭ la lumo de vero, nek estas nek jam povas esti kreita aŭ fariĝita." Pri sanktaj skriboj, malsame kun aliaj Kristanoj, Mormonoj rekonas tri librojn kiel sanktaj skriboj, aparte de la Biblio: la Libro de Mormon, la Multevalora Perlo, kaj Doktrino kaj Interligoj, kies la lastaj du konsistas aŭ parte aŭ tute el la instruoj de Joseph Smith.

FORPASIS LA LIVONA LINGVO

Lingvoj povas malaperi el la mondo, ni scias kazojn, por kiuj tio jam okazis kaj aliajn, kies ekzisto estas minacata. Oni taksas, ke eĉ naciaj lingvoj de grandaj ŝtatoj, kiuj havas anojn maksimume kelkajn milionojn, povos baldaŭ esti en minaco malaperi. Unu tia lingvo estas la latva. Dum tempo de Sovetunio la latva lingvo

estis jam preskaŭ iĝanta minoritata lingvo en sia propra regiono, ĉar nombro de ruslingvanoj daŭre kreskis tie. Nun ŝajnas, ke latva ne estas rekte minacata, ĉar ĝi tamen restas la ĉefa lingvo de memstara Latvio. Interese tamen estas, ke samtempe la latva lingvo forpuŝis kaj anstataŭis ankoraŭ pli malgrandan lingvon en sia regiono, la livonan.

Tia finno-ungara lingvo estis parolata en la nordaj partoj de la nuntempa Latvio. En la unua duono de la 20a jarcento la nombro de livonparolantoj ankoraŭ estis ĉ. mil kaj la lingvo vivis kaj oni publikigis literaturon en ĝi. La decidaj mortobatoj por la lingvo estis la dua mondmilito kaj la popolaj perfortaj translokiĝoj en Sovetunio. La gento suferis en superrulado de du armeoj kaj restis kelkaj centoj da ili loĝantoj dise en diversaj lokoj de Sovetunio.

En februaro 2009 mortis Viktor Berthold, kiun oni konsideris la lasta denaska parolanto de la livona. La lingvo estas bone dokumentita kaj ekzistas homoj, kiuj lernis paroli ĝin, hobias pri ĝi kaj konservas ĝian tradicion, sed apenaŭ plu ni povos iam konsideri ĝin vivanta lingvo.

La livona klare similas la finnan. Ni finnoj povas preskaŭ diveni la signifon de la vortoj en la nacia himno de la livonoj. Kaj kio interese, ĝia strukturo tiom similas la finnan, ke la himno en laŭvorta traduko en la finnan estas tuj kantebla en la sama melodio - la sama kiu estas en la nacia himno de Finnlando, kaj ankaŭ de Estonio. Signifo en Esperanto:

*Mia patrolando, mia naskiĝlando,
estas kara bordo vi,
kie ĉe l' bordo kreskas
ankoraŭ aĝaj, saĝaj pinaroj.
Mia kara sola estas tie-ĉi vi,
mia kara patrolando!*

Esperantolehti, decembro, 6/2009

FOTOJ DE ESPERANTAJ EVENTOJ DE EBG



E-café organizita de Nikolao De Buyl, 26.08.2011, Ĉe Wodek Atelier Muzeum 340 De Rivieren Dreef



Esperanta Budo en Voluntula Vilaĝo de Eŭropa Parlamento kun Guido de Ricci inter aliaj, 9-12.09.2011




Rodica Todor inter alie prelegis Ĉe la E-Klubo "La Progreso" de Gento kaj "Verda Stelo" de Antverpeno



Rodica Todor inter alie prelegis ankaŭ Ĉe la fervojistoj de BEFA kaj Ĉe nia Esperantista Brusela Grupo



Rodica Todor el Rumanujo, prezidantino de Internacia Fervojista E-Federacio, en Belgujo 17-27.09.2011



Kiel ege demandite de diversaj legantoj de Aktuala, inter aliaj kelkaj belgaj fervojistoj de BEFA, nia bulteno ek-re-publikas esperantajn vortarajn paĝojn kun desegnaĵoj.

Miaj vestaĵoj



ŝtrumpetoj



kalsoneto



subĉemizo



pantalono



ĝinzo



T-ĉemizo



jupo



ĉemizo



kravato



ŝorto



kalson ŝtrumpoj



robo



pulovero



sportĉemizo



trikjako



koltuko



nasztuko



sportŝuoj



ŝuoj



sandaloj



botoj



gantoj



poŝoj



zono



buko



zipo



ŝulaĉo



butonoj



butontruo



mantelo



jako



kaskedo



ĉapelo

Homoj



aktoro

aktorino



kuiristo



dancistoj



kantistoj



kosmonaŭto



viandisto



policanoj



ĉarpentisto



fajrestingisto



artista



juĝisto



maŝinistoj







ANDRÉ DEMARQUE



Membro de EBG, estrarano de Kvinfolio, organizanto de KuKo en Louvain-la-Neuve